

tempo

Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo

Časopis Hrvatskog saveza za esperanto

aprilo 2000

marioneta internacia renkontiĝo

en Bizovac, Kroatio

de la 14a ĝis la 18a de aprilo 2000.

MIR.

La nova kroata registaro kaj Esperanto

Ministerio pri Eskterlandaj Aferoj de Kroatio respondis

La 7a MIRO en Bizovac

86a Universala Kongreso de Esperanto en Zagreb

Đurđevac gastigas la 4an kongreson de kroataj esperantistoj en majo



KARAJ LEGANTOJ!

Multaj novaĵoj en la ankoraŭ relative juna jaro 2000.

Precipe gravas ke ni aktivas en novaj politikaj cirkonstancoj, kiuj donis al la lando fortan proeŭropan orientiĝon. Estas agrable labori sub la nova elano, sed bedaŭrinde la kaso je ŝtataj kaj privataj niveloj estas sufiĉe malplenaj.

Ni atentigas vin pri la artikolo pri la nova registaro kaj Esperanto. Estas interese aldoni ke konsilanto por la ekstera politiko de la prezidento Stipe Mesić, d-ro Stanko Nick en februaro en Mediteranea Diplomata Akademio en Malto prelegis pri la lingvo de diplomatio en kiu li traktis, interalie, ankaŭ pri eblecoj de Esperanto.

Nia lasta publika elpaŝo en decembro kiam Kroata Esperanto-Ligo kaj Kroata Esperanto-Junulara Asocio kune prezentiĝis ĉe la Zagreba Foirejo postlasis bonan impreson al la organizanto: Registara oficejo pri organizoj. Jen en ĉi-foja *Tempo* io malofte vidata: *Zagreba Foiro* pagas sian reklamon por prezenti sin.

Ni vigle laboras por la konstruado de la Universala Esperanto Kongreso en Zagreb.

Ekfunkciis nia ttt-paĝo prizorgata de Ivan Špoljarec. Ni invitas vin viziti ĝin ĉe

<http://pubwww.srce.hr/esperanto-kel>.

La afiŝo de Tea Janković kaj Ivica Ivaci pri la 7a MIRO - Internacia Junulara Renkontiĝo okazonta en Bizovac, ornamas nian titolpaĝon.

Por aprilo estas antaŭvidita granda kleriga kurso por turismaj gvidantoj kiun organizas *Generalturist*, la oficiala agentejo de la Universala Kongreso. Krom la dutaga teorio, la partoprenantoj spertiĝos pri praktiko kaj ekzameniĝos.

En Đurđevac esperantistoj vigle laboras por organizi nian kvaran kongreson.

Gramatiko, infanlibro kaj kroatlingva informlibro pri Esperanto estos novaj eldonaĵoj el Kroatio.

Nikola Rašić, konstanta kongresa sekretario el Roterdamo havis plurajn kunsidojn kun kelkaj membroj de LKK. En la nuna fazo plej gravas fakoj pri loĝigo, (gvidanto Dalibor



Šeatović) eskursoj (gvidanto Faruk Islamović) kaj kulturo. La plurkapa teamo pri la kultura programo de UK, gvidata de Miroslav Jerković, planas imponan kulturalan programon. (Sur la foto Rašić kun Jurica Borojević, LKK-ano pri la junularaj aranĝoj.)

Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-Societo *Bude Borjan* festas en 2000 sian 55an jubileon. Impona tempotranĉo!

S. Štimec

Tempo

Jaro XIX, numero 1/2000
Gazeto de Kroata Esperanto-Ligo

Aperas laŭeble kvar foje jare

ISSN 0352-1583

Redakcio: Kneza Mislava 11/III, Zagreb, Kroatio

tel: (385 1) 46 17 550, fakso: (385 1) 46 19 373

rete: esperanto@zg.tel.hr

<http://pubwww.srce.hr/esperanto-kel>

Kontribuis: Lucija Borčić, Jurica Borojević, Danijela Drakula, Faruk Islamović, Štefica Orešković, Ivan Špoljarec, Spomenka Štimec kaj Milan Zvara
Entajpis: Milka Đukić kaj Spomenka Štimec
Lingve konsilis: Lucija Borčić
Redaktoris: Spomenka Štimec

Anonc-tarifo: 1/1 paĝo 800 kn, 1/2 paĝo 500 kn, 1/3 paĝo 350 kn, 1/8 paĝo 200 kn.

Eta anonco 100 kn. (kovrilpaĝo duoble).

Abono

4 numeroj jare 40 kn (10 DEM)

unuopa numero 10 kn (2,5 DEM)

Bv. aldoni sendokostojn 1,5 DEM por ĉiu numero al eksterlando.

La redakcio ne respondecas pri la opinioj en la subskribitaj tekstoj.

Redakcija ne odgovara za miŝljenja iznesena u potpisanim člancima.

LA NOVA KROATA REGISTARO KAJ ESPERANTO



Kroata Esperanto-Ligo invitis plurajn aktivulojn de la kroata kultura kaj politika vivo al la Honora Komitato de la zagreba Universala Kongreso. Jam 17 gravaj personoj jesis al la Honorkomitato. Dum KEL atendas la opinion de la estraro de UEA pri la proponitaj personoj, okazis gravaj ŝanĝoj en la politika vivo de Kroatio. En januaro estis elektita la nova registaro per kiu la politika vivo de Kroatio turnis novan paĝon. La registaro nun elektita, kun intensaj akcentoj je maldekstremo, estas la registaro sub kies regado evoluos la 86a Universala Kongreso de Esperanto. Tial verŝajne por estontaj paroprenantoj ne estus malbone koni kelkajn detalojn pri rilato al Esperanto de kelkaj membroj de HK, kiu en la nova registaro transprenis gravajn postenojn.

La du vicprezidantoj de la registaro estas la personoj por kiu Esperanto neniel estas novaĵo. S-ro Slavko Linić el la Socialdemokrata Partio estas la persono kiu en Esperanto malfermis la Internacian Junularn

Kongreson en Rijeka en 1998, akceptis la kongresanojn en la urbo-domo de Rijeka kaj donis multajn valorajn konsilojn al la tiama LKK. La dua vicprezidanto en la registaro estas lia sampartiano s-ino Željka Antunović, kiu kiel deputito gvidis en la Parlamanto komitaton por junularo kaj dum la epoko de IJK donis plurajn utilajn konsilojn pri la organizo de la kongreso. Ŝi estas membro de la Honora Komitato de UK 2001.

Ministro pri naturprotektado s-ro Božo Kovačević komence de la 90aj jaroj donis intervjuon al *Monato* pri sia politika agado en Liberala Partio.

Se paroli pri la membroj de la Honora Komitato, pluraj el ili transprenis gravan politikan funkcion: d-ro Biserka Cvjetičanin estis elektita vicministro de kulturo. En tiu posteno ŝi la 29an de februaro 2000 akceptis en Kulturministerio Spomenka Štimec kaj Nikola Rašić kaj donis plurajn konsilojn pri UK 2001. Plurfoje ŝi partoprenis en konferencoj de UNESCO kaj notis elpaŝojn de esperantistoj.

S-ino Cvjetičanin estas granda konanto de la afrikaj kulturoj. Ŝi interalie verkis enkondukon al la Esperanta traduko de poemoj de Agostinho Neto.

Pluraj aliaj personoj el la HK nun okupas gravajn politikajn postenojn. S-ino Naima Balić el HK en la Kulturministerio transprenis la postenon de konsilanto.

S-ino Dorica Nikolić, membro de HK, estis elektita deputito en la Kroata Ŝtata Parlamento.

D-ro Stanko Nick diplomato en Ministerio de Eksterlandaj Aferoj inklinas al Esperanto ekde la tempo kiam pri ĝi en Aŭstralio informis lin

Tibor Sekelj. En sia libro *Diplomatia* d-ro Nick en pluraj lokoj traktas pri latentaj ebloj de Esperanto en la politika vivo. Pri la temo *Lingvo de diplomatio* li prelegis en ferbuaro en Mediterana Akademio en Malto, kie li interalie tuŝis Esperantan temon. D-ro Nick estas interalie granda admiranto de la franca kulturo kaj li kun granda plezuro ĉeestis la okto-bran koncerton de Jacques Yvart en Zagreb, organizita de KEL (sur la foto).

Li estis elektita por la konsilanto de la prezidento Stipe Mesić kaj de la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj transiris al Pantovčak, al la Palaco de la prezidento, kie li estas konsilanto pri eksterlanda politiko.



Verŝajne ne multaj Universalaj Kongresoj havis en siaj vicoj de la Honora Komitato tiom prestiĝaj homoj, kiuj tiom profunde rilatas al Esperanto.

Kun tiaj helpantoj en HK la kongreso en Zagreb povus havi tute apartan akcenton.

S. Štimec

MINISTERIO DE EKSTERLANDAJ AFEROJ DE KROATIO PRI ESPERANTO



Tempo de oktobro 1999 raportis pri la konsultiĝo de Landaj Esperanto-Asocioj de Mez-eŭropaj landoj en Liptovsky Jan en Slovakio. La gastiganto de la Konsultiĝo Slovaka Esperanto-Federacio direktis al altrangaj politikaj instancoj de ĉiuj partoprenintaj landoj rekomendon esplori la eblojn kaj ekuzi ankaŭ la neŭtralan lingvon Esperanto kiel pontlingvon por proksimiĝi al egalrajta lingvouzo. La rekomendo estis verkita en la koncerna lingvo de la lando.

El tri kroataj adresoj la respondo venis el la kroata Ministerio de Eksterlandaj Aferoj. La leteron subskribis Zoran Bošnjak kabinetestro de la ĉefministro. Li traktis la leteron direktitan al la ministro de eksterlandaj aferoj Mate Granić. En la novaj politikaj cirkonstancoj post la elekto, s-ro Bošnjak restis kabine-

testro de la ministro pri eksterlandaj aferoj Tonino Picula.

S.Š.

Jen la teksto de la kerno de la letero:

Estas mia plezuro saluti la iniciaton de la apliko de la internacia lingvo Esperanto kiel ilo en la alproksimigo al la pli justa lingva politiko kaj en plifaciligo de kompreniĝo inter la parolantoj de la diversaj lingvoj.

Kadre de niaj regulaj aktivecoj ni observas kaj subtenas la aktivecojn de Kroata Esperanto-Ligo kaj ĝeneralajn klopodojn por pli justa traktado de la lingvo je la eŭropa nivelo.

Tio estas la unuan fojon en la historio de Kroatio ke Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj de Kroatio deklaris sian opinion pri Esperanto.

NOVA ESPERANTO - SOCIETO EN SLAVONSKI BROD

Instigita per la Tria kongreso de kroataj esperantistoj lastjare en Osijek, Franjo Gruić iniciatis Esperantan kurson en Gimnazio de Slavonski Brod kaj la refondon de Esperanto-Societo Slavonski Brod. La esperantistoj havis fondkunvenon kaj nun registras sian statuton. Prezidanto de la klubo estas Franjo Gruić, sekretarias Štefica Orešković. La societo ricevis rajton uzi la ejon de la loka komunumo. Ĝia adreso: Esperanto-Societo, Štefica Orešković, Kumičićeva 94, 35000 Slavonski Brod.

La Esperanta strato inaŭgurita en Slavonski Brod en 1961 dum la tempo de stagnado de la societo estis nuligita. Ĝi nun portas novan nomon.

Al la societo kiu havis riĉan historion, al la urbo kiu eldonis *La Sudan Stelon*, Tempo deziras bonan laboron!

Štefica Orešković

LA 7-A MIRO

Ĉu vi ŝatas amuziĝi, ludi, ekskursi, ekkoni gejunulojn, amikiĝi, babili kaj naĝi? Vi povas fari ĉion se vi venos kaj partoprenos la 7-an MIRON, faman renkontiĝon kiu organizas KEJA (Kroata Esperanto Junulara Asocio).

La temo da le ĉijara MIRO estas teatro. Tial ni nomis ĝin la Marioneta Internacia Renkontiĝo. Multaj prelegoj, interesaj laborgrupoj kaj teatraĵoj pritraktos diversajn aspektojn de teatro. Krom la temaj programeroj okazos deversaj distraj laborgrupoj, sportaĵoj kaj ekskursoj. Ĉijara MIRO okazos inter la 14-a kaj la 18-a de aprilo 2000 en Bizovaĉke Toplice (Termofontoj de Bizovac) apud Osijek. La loko estas vera paradizo por amantoj de akvo. Tie estas pluraj naĝejoj en kiuj ni festados, diboĉos, ...

Organizantoj promesas riĉan sportan programon kaj neforgeblajn akvajn ludojn! Ĉi tio estas la plej bona ŝanco por vi ekkoni junajn esperantisti/ino/ojn kaj ne nur el Kroatio sed ankaŭ el aliaj landoj.

Venu kaj vidu kial multaj junaj esperantistoj venas de jaro al jaro al MIRO!

Por pliaj informoj kaj aliĝoj kontaktu:

Hrvatska esperantska mladež (KEJA)

Amruševa 5

HR-10000, Zagreb

Kroatio

tel. 385 1 4810152

rete: irinabarac@yahoo.com

http://pubxxx.srce.hr/keja

Jurica Borojević



SPOMENKA ŜTIMEC INSTRUAS EN SAN FRANCISCO

Ekde la 26a de junio ĝis la 14 de julio 2000 Spomenka Ŝtimec instruos Esperanton en la plej fama universitato Esperanto-flegejo en Usono San Francisco State University. Ŝi jam instruis en San Francisco en 1995. En San Francisco Esperanto estas instruata je kvar niveloj kaj ĉiu el kvar instruistoj instruas je ĉiuj niveloj. La administra organizanto de la kursoj kun pli ol kvarjardeka tradicio estas Ellen M. Eddy kaj la ĉefprofesoro en 2000 estas Grant Goodall el Usono. Aliaj instruistoj estas Dennis Keefe kaj Reza Kheir-khan.



San Francisco State University
1600 Holloway Avenue
San Francisco, California 94132

BLINDA ESPERANTISTO ENPOSTENIĜIS EN MINISTERIO

Antun Kovač, blinda esperantisto el Velika Gorica estas la unua blinda persono kiu enposteniĝis en iu kroata ministerio. Li ekpostenis en 2000 kiel konsilanto en Ministerio de mediprotektado. Kovač interalie klopodas pri reaktivigo de Asocio de kroataj blindaj esperantistoj, renkonte al la jaro 2001.



MILA GAJNIS AŬTON

Konata zagreba Esperanto-aktivulino el junularaj rondoj Mila Bečka tre sukcese partoprenis en la marta TV-kvizon titolita *LA TRIAN FOJON VI SUKCESOS*. Ŝi sukcese respondis al la starigitaj demandoj kaj gajnis 10.000 kn. La premio ebligis al ŝi ankoraŭ foje partopreni en la kvizo. Ĉe la dua sesio ŝi venkis kaj gajnis - aŭton.

Mila sciis profiti de la televida elsendo: ŝi aparte salutis esperantistojn.

RETADRESARO

Kroata Esperanto-Junulara Asocio: keja @ esperanto.nu

Neven Mrzlečki: neven.mrzlecki@zg.tel.hr

Snjezana Ivanović: snjezana@mairmo.irmo.hr

Miroslav Jerković: miroslav.jerkovic@inet.hr



Universala
Kongreso de Esperanto
Zagrebo - Kroatio

86A UNIVERSALA DE ESPERANTO

MESAĜO DE LA ĜENERALA SEKRETARIO DE UEA

Mesaĝo de la ĝenerala sekretario de UEA s-ino Michela Lipari:

La estraro de UEA akceptis la proponojn pri la konsisto de la Honora Komitato de la UEA kongreso en Zagreb. Ĝi subtenis la iniciaton de Zagreb invitigi al la zagreba kongreso s-ro Kofi Annan de la Unuiĝintaj Nacioj.

La estraro ankaŭ decidis pri la kongresa temo:

KULTURO DE DIALOGO - DIALOGO INTER KULTUROJ

LA KONGRESEJOJ

Dum la Universala Kongreso en Zagreb la kongreso okazos en du ejoj: La koncertejo *Vatroslav Lisinski* kaj *Fakultato de Elektrotekniko kaj informatiko*, nomata FER. Ambaŭ ejoj troviĝas en la sama strato, ilin dividas la urbodomo de Zagreb. La ejoj estos kunligataj per busetoj. La koncertejo *Vatroslav Lisinski* en sia ĉefa salono povas akcepti 2000 personojn. La kongresanoj kiuj aliĝos post la unuaj 2000 spektos la malfermon el apudaj salonoj apud la ĉefsalono. Ni invitas ĉiujn al frua aliĝo kaj dankas pro komprenemo.

LA UNUA BULTENO PREPARATA

En Centra Oficejo de UEA oni preparas la Unuan bultenon de la Universala Kongreso de Esperanto, kunlabore kun Turisma Asocio de la Urbo Zagreb. La planita eldonkvanto estas 20.000 ekz. Ĝi estu je via dispono ekde la Kongreso en Israelo kune kun la aliĝilo por Zagreb.

LA AGENTEJO GENERALTURIST ORGANIZAS KURSON

La kongresa agentejo *Generalturist* invitas esperantistojn trejniĝi pri la turisma fako. La 3-taga kurso kiu antaŭvidas teoriajn sciojn kaj praktikon kiel gvidi dum turismaj busvojaĝoj okazos en aprilo. Trideko da kroataj esperantistoj montris intereson pri la aranĝo kaj planas spertiĝi por UK.

NOVAJ PROSPEKTOJ PRI ZAGREB



Urba asocio por turismo planas eldoni du pliajn prospektojn por la UK 2001.

Unu traktas la urbon Zagreb kaj la alia ĝian ĉirkaŭaĵon. La prospekton pri Zagreb tradukis Lucija Borčić. La prospektoj estos je la dispono en Tel Aviv.


INFANA KONGRESETO 2001

Pri la infana kongreseto zorgas Ankica Jagnjić. Patrino de tri infanoj el kiuj du fluas Esperante kaj la tria estas en beboaĝo, proponas por la Infana Kongreseto montaran domon sur Sljeme, la monto apud Zagreb. La domo disponas pri 60 lokoj.

ESPERANTO-EKZAMENO EN JASENOVAC

Danijela Drakula finis sian etan Esperanto-kurson en la biblioteko de Jasenovac.

Jen la lernantinoj dum la ekzameno, kiam en Jasenovac gastis Jurica Borojević nome de Kroata Esperanto-Junulara Asocio. La knabinoj de Jasenovac planas partoprenis sian unuan internacian aranĝon, la 7an MIRON. Micukawa Sumiko kaj ŝia rondo de de-segnantoj en Japanio eble ŝatos scii ke ilia ornam-pentraĵo kun bondeziroj pendas en la biblioteko Jasenovac.



KONGRESO EN ZAGREB

KIEN EKSKURSI DUM UK EN KROATIO?



Faruk Islamović transprenis la grandan taskon esplori pri la eblecoj kion proponi al la kongresanoj 2001 en Zagreb el turisma vidpunkto. Li nun kreas ekskursan teamon kaj invitas ĉiujn helpantojn kontakti lin. Lia ĉefa partnero en tiu granda kongresa tasko estas la profesia firmao Generalturist, kiun ni prezentis en la lasta Tempo. Generalturist planas grandan edukan kurson por ĉiuj helpantoj de la kongresaj ekskursoj. La helpantoj povos en la jaro 2000 diplomiĝi kaj ricevi atestilon pri turisma akompananto kaj ankaŭ post la zagreba UK profesie en libera tempo labori por la koncerna firmao en la turisma fako. Ĉiu helpanto de ekskursoj havos senpagan trejnadon. Al la kurso povas aliĝi nur lingve senriproĉaj helpantoj kiuj gvidos la aŭtobusojn.

Se eskursos nur 2000 homoj dum la eskursa tago ni bezonas - 40 helpantojn.

En la nuna fazo de la preparlaboroj Faruk preparis la liston de la ekskursoj celoj. Li invitas la kroatajn esperantistojn helpe pri pensi la ekskursan programon. La estontajn kongresanojn li invitas esprimi al li siajn dezirojn.

Dum la kongreso ĉiun tagon okazas duonkongresaj ekskursoj. Tamen plej gravaj estas la tuttagaj ekskursoj. Ili kutime okazas en la mezo de la kongreso semajno, merkredon, kiam fermiĝas la kongresejo kaj ĉiuj direktiĝas al ekskursoj. Kutime Universalaj Kongresoj ofertas ses ekskurscelojn. La ekskurso inkluzivas tagmanĝon. Kutime ĝi ne daŭras pli ol 10 horoj.

Ekskurso 1

LA LAGOJ DE PLITVICE

16 lagoj kiuj ĉeniĝas unu al la alia formas unikan eŭropan ekskursejon. Nacia Parko, protektata de UNESCO, la oazo de arbaroj kaj akvoj, neevitebla celo por ĉiu ŝatanto de naturo en Kroatio.

Ekskurso 2

DUBROVNIK (PER AVIADILO)

La plej unika adriatika turisma punkto, dum jarcentoj sendependa respubliko, ravas per siaj marsituo, arkitekturo kaj kulturo.

Ekskurso 3

ADRIATIKA MARO

Naĝado en la Adriatika Maro ĉe Crikvenica. Adriatika Maro somere ravas per sia varmo, sanigo kaj belo. En Kroatio la maro prave daŭre nomiĝas blua.

Ekskurso 4

ZAGORJE - La ekskurso proponas trarigardadon de la pitoreska regiono Okcidenta Zagorje. La regiono abundas je mezepokaj kasteloj, postrestaĵoj de la riĉa feŭda historio. Nia ekskurso vizitigos la kastelon de Veliki Tabor. Survoje ni haltos en Klanjec por konatiĝi kun la skulptista laboro de fama kroata skulptisto Augustinčić, kaj ni vizitos ankaŭ etnovilaĝon Kumrovec. En ĝi oni povos konatiĝi kun la naŝĝdomo de la iama jugoslavia ŝtatestro Tito kiu konis Esperanton. Halto en la ĉefurbo de la regiono Krapina.

Ekskurso 5

VARAŽDIN


Varaždin estas unu el la plej belaj barokaj urboj de Kroatio. Ĝi estis iama ĉefurbo de Kroatio. Baroka arkitekturo famigis la urbon sed ankaŭ ĝia muziklernejo. Survoje al Varaždin la kongresanoj haltos en la ĉefurbo de la regiono Zagorje - Krapina. Dum la ekskurso kongresanoj vizitos ankaŭ faman kastelon-muzeon de la grafa familio Drašković en Trakošćan. Ankaŭ la bela kastelo Maruševac apud Varaždin estas vizitota. Vizitantoj konatiĝos kun la fama regiona preĝejo Lepoglava, kies unikaj manbrodaĵoj famiĝis tra la mondo.

Faruk Islamović
LKK-ano pri ekskursoj
tel.01/213-633, fakso 4619373
Bv. indiki: Por Faruk
elita@zg.tel.hr



daŭrigota

LA KVARA KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ



*Kiam? La 27an de majo 2000
Kie? En ĉurĉevac kie
Organiza komitato: Esperanto,
pp. 96, 48350 ĉurĉevac*

EL LA PROGRAMO

Jarkunveno de KEL
Kunsido de LKK
Kvar novaj libroj prezentotaj
Koncerto de Lada Kos kaj Neven
Mrzleĉki
Urbotrarigardo
Filatelia poŝtkarto
Koktelo
Lingvoleciono
Antaŭ premiero de UK 2001:
**Kontribuoj de kroataj esperantistoj al
la monda E-komunumo**
**Prizorgas membroj de la Drama
Grupo de SEK**
Urboprospekto
Kolora afiŝo de la kongreso

Grava atentigo:

Kroata Fervojista Esperanto-Asocio
zorgas pri speciala Esperanta vagono
al ĉurĉevac. Planata ekiro de la
trajno matene je la 7.32. reveno
18.50.

Kosto de la veturo, 10 kn. Bonvolu
pagi la bileton anticipe! KFEA
akceptas pagojn por la veturo nur ĝis
la 16a de majo 2000 en siaj ejoj,
Tomislavov trg 11/4, kie
la renkontiĝoj okazas marde je la 18.

○

4. KONGRES HRVATSKIH ESPERANTISTA
4-a KONGRESO DE KROATAJ ESPERANTISTOJ
ĉURĉEVAC, 27. svibnja 2000 - ĉURĉEVAC, la 27-an de majo 2000

Stalna kongresna adresa: Hrvatski savez za esperanto, Kneza Mislava 11/III, 10000 Zagreb
Organizacijski odbor: Esperanto, p.p. 96, 48350 ĉurĉevac

ĜURĜEVAC

NIA KONGRESURBO —

EN KORORO DE PODRAVINO

En fekunda, per maro de maiz- kaj gren-kampoj striita ebenaĵo, inter la deklivoj de Bilogora unuflanke kaj flu-ejo de la rivero Dravo aliflanke, situas la urbo de Sankta Georgo - Ĝurdevac. Reakirinte en la plej proksima pasinteco statuson de urbo, ĉi tiu negranda loko kun proksimume 7000 enloĝantoj, vivas per sia kutima ritmo. Ĝi kuŝas 25 kilometrojn sudoriente de Koprivnica, centro de la Distrikto Koprivnica-Križevci, ali kiu Ĝurdevac administre apartenas. De Zagrebo ĝin dividas 120 kilometrojn longa vojo al sudokcidento, kaj al Virovitica la vojaĝo longas 45 kilometrojn sudorienten.

La unuaj skribaj notoj pri la urbo aperis en la jaro 1267.

Dum la vilaĝo Ĝurdevac ŝanĝadis posedantojn, restas neklare kiam ekestis la fortikaĵo, hodiaŭ konata kiel Malnova urbo. Supozeble ĝin konstruigis unu el la kvin malpacigintaj filoj de banuso Mikac, kiuj post morto de la patro malpace dividis la posedaĵon de la banuso. La sola ĝusta konfirmo pri Malnova urbo devenas el la fino de la 15-a jarcento, kiam la urbon posedis Ernuŝ-familio. Sur ŝtona tabulo super la enirejo de Malnova urbo konserviĝis blazono de Sigismundo Ernuŝ, kaj notita la jaro 1488. La surskribo diras nenion aparte gravan, sed evidentiĝis, ke en la tempo de Ernuŝoj, Malnova urbo travivis gravajn konstruajn ŝanĝojn kaj akiris la hodiaŭan aspekton, kia konserviĝis en la priskribo de la fortikaĵo el la mezo de la 16-a jarcento. Post malvenko de la hungara armeo en la kampo de Mohaĉ, en la jaro 1526, turkoj tre intense milite alvenadis en la najbarajn regionojn, kaj la fortikaĵo fariĝis grava defenda objekto.

Tiutempe la loĝantaro migris al pli pacaj lokoj, kaj la regiono dezertiĝis. Finfine, post multaj historiaj ŝanĝoj, la fortikaĵo troviĝis ĝuste sur la limo de turkaj atakoj. En la jaro 1548 la reĝo Ferdinando ordonis al tiama kapitano Luka Sekelj prifortigi la fortikaĵon, kio

okazis lastmomente, ĉar en la jaro 1552 post falo de Virovitica, la fortikaĵo en Ĝurdevac kunfrontiĝis al la turka invado.

Tako de la urbo estas la 23-an de aprilo je Sankta Georgo. Sed, ŝajnas, ke pli granda festo okazas jaron post jaro dum lasta semajnfino de julio. Temas pri fama "Picokijada", urba festo kiu rememorigas pri "picoki" kaj turkaj tempoj. "Picok" signifas "koko", sed tiun nomon portas ĉiu origina loĝanto de Ĝurdevac. La legendo pri "picoki" ekstis en la tempo kiam Ulama-bejo, gvidanto de turka soldataro sensukcese sieĝis la urbon. Kiam en la urbo ekmankis nutaĵoj, la defendantoj metis la lastan kokon en la kanontubon kaj elpafis ĝin al la turka tendaro. Surpriziĝis Ulama-bejo kaj pensante ke la defendantoj estas sataj kaj primokas lin, forlasis la urbon nekonkeritan.

Dum ĉiujara festo ĉirkaŭ la fortikaĵo reviviĝas scenoj el turkaj bataloj kun multaj piroteknikaĵoj, rajdantoj kaj aktoroj memore al la glora pasinta tempo. Kvankam la surscenigo de la batalo estas certe la plej interesa ero de la nomita programo, indas viziti ankaŭ aliajn: ekspozicion de aranĝitaj ĉaroj kiuj pasas tra urbaj stratoj kaj prezentas originalajn vilaĝajn laborojn kaj laborilojn.

Sed, la urbo ne vivas nur dum "Picokijada". La urbo estas kultura centro, aparte post modernigo de Urba biblioteko kiam posedas malmultaj urboj en Kroatio. En Malnova urbo troviĝas galerio, kiu antaŭ kelkaj jaroj pliampleksiĝis per aparta kolekto kiun al la urbo donacis Ivan Lacković-Croata, fama pentristo el ĉi tiu regiono. La urbo posedas radio-stacion, kinejon, elementan kaj mezlernejon.

El inter pli interesaj objektoj en Ĝurdevac mem vizitindas tre bele restaŭrita preĝejo de sankta Georgo el la jaro 1928, kaj el naturbelaĵoj la pina arbaro Borik, kiu konserviĝis kiel park-arbaro dank' al ekologia edukiteco de la loĝantaro.

Iam tre fama "Kroata Saharo", dunoj de pro vento moviĝanta sablo, fariĝis nur protektita botanika rezervejo. Per tre intensa laboro la loĝantaro sukcesis arbarigi la naturan dezeriton, kaj la ĉirkaŭaĵo fariĝis verda oazo. Pri la iama dezerto oni memoras nur pro tio, ĉar nuntempe la sablo estas ekspluatata kiel konstru-materialo kaj transportata al diversaj partoj de la lando.

En energia senco, la regiono estas konata kiel la plej granda eŭropa ekspluatejo de tergaso, kun aparte gravaj instalaĵoj de nacia kompanio INA apud Molve. Preparata estas projekto de granda hidroelektrajo sur la rivero Dravo apud Ferdinandovac, kiun kontraŭstaras "verduloj" pro danĝero kiu minacas detruiri la naturon de la regiono.

Deklivoj de Bilogora, de kiu vastiĝas vidkampo al la ĉirkaŭaj vilaĝoj, konservas riĉecon de malnovaj vinberejoj kaj vinber-dometoj kun bonaj regionaj vinoj.

Agrikulturo daŭre restas la ĉefa parto de ekonomio. Dominas grenoj kaj maizo, sukerrapo, fruktoj kaj legomoj, kaj en bredado de bestoj ĉefas porkoj kaj bovinoj, dum tie kaj tie aperas ŝafoj kaj kaproj. La lakto ĉi tie produktata estas aparte kvalita, kaj per instalo de moderna laktofabrika, Agrikultura kooperativo ofertis al la merkato novajn lakto-produktojn, specifajn por ĉi tiu regiono.

Industrio estas malforta, kaj menciindas nur lignoindustrio kaj aparte ŝuproduktado.

Se vi trovos vin hazarde en Ĝurdevac, sidiĝu sub la ombroj de la urba parko aŭ interne de la muregoj de Malnova urbo. Aparte eluzu la okazon viziti ĝin dum la 4-a kongreso de kroataj esperantistoj, ĉar Ĝurdevac havas ankaŭriĉan Esperantan tradicion. En ĝi naskiĝis Fran Kolar Krom, tradukinto de "La trezoro de l' oraĵisto", kiu fariĝis la unua romano el la kroata literaturo tradukita en Esperanton.



Josip Pleadin

LINGVA ANGULO

Atentu pri TRANSITIVECO KAJ NETRANSITIVECO DE UNUOPAJ VERBOJ



transitivaj verboj:

ABONI	aboni esperantajn gazetojn
ANSTATAŬI	anstataui la kursgvidanton
ĈAGRENI	ĉagrenas nin la perdo de tempo / Ne ĉagreniĝu
DECIDI	ni decidu kiu gvidos la kurson / Li decidiĝis foresti
DOLORO	doloras min la kapo
FANDI	la suno fandas la neĝon / La neĝo fandiĝas
FINI	ni finas la kurson / La kurso finiĝas
KIRLI	bone kirlu la kremon
KOMNCI	Li komencis la prelegon / La prelego komenciĝis
KREI	La dio kreis la mondon
KREDI	Mi kredas viajn vortojn
KUIRI	La patrino kuiras supon
LUI, LUPRENI, LUDONI	– lui novan loĝejon
MEMORI	Mi memoras viajn vortojn
NASKI	Ŝi naskis ĝemelojn / La ĝemeloj naskiĝis
PAŜTI	La paŝtisto paŝtas bovinojn
RIFUZI	Mi rifuzas fari tion
RULI	La rivero rulas ŝtonojn / La ŝtonoj ruliĝas
SUFOKI	Ne sufoku lin!
SVATI	Li svatis mian filinon
ŜANCELI	Liaj argumentoj ŝancelis min
TURNI	Turnu la paĝon
VEKI	Ne veku min tro malfrue



netransitivaj verboj:

AKORDI	Li ne akordas kun mi
AKUŜI	La patrino sukcese akuŝis
ALMOZI	Li ĉiam almozas antaŭ nia domo
BRULI	La ligno brulas bone
ĈESI	La milito fine ĉesis
DAŬRI	La kurso daŭras kvar monatoj
DISPUTI	Li disputis kun sia patrino
DRONI	Li dronis en la maro / Ne dronigu lin
ENUI	Li enuis dum la prelego
ERARI	Mi eraris pri tio
FARTI	Nia familio fartas bone
FROSTI	Dumvintre mi frostas
HALTI	Ne haltu ĉe ĉiu montrofenestro
HASTI	Vi devas hasti por veni ĝustatempe
IMPETI	La maro impetas al la bordo
INDIGNI	Ne indignu pro lia ago
KAŬRI	La infano kaŭras antaŭ la pordo
KONDUTI	Liaj infanoj bone kondukas
KONSISTI	Nia domo konsistas el kvar etaĝoj
KRAKI	La glacio krakas sub niaj piedoj




VIA FIDINDA NEGOCPARTNERO

*Taŝ
pouzđani
poslovni
partner*

Zagrebački 
Velesajam

ZAGREBA FOIRO



AL XXXVIII
BONVENNO
 ESPERANTISTA KONGRESO
 EN ZAGREB - 1953

Foroj kaj multo de MARIO KINEL

Arr.: LI KONTARIĆ

Tempo de marŝo

1. doneton.
 2. *mf*
 3. *mf*

1. doneton.
 2. *mf*
 3. *mf*

1. doneton.
 2. *mf*
 3. *mf*

1. doneton.
 2. *mf*
 3. *mf*

1. doneton.
 2. *mf*
 3. *mf*

1. doneton.
 2. *mf*
 3. *mf*

Copyright 1953 by Author - All rights reserved.
 Cifraj rajtoj rezervitaj.

Stampo en U. P. R. J.
 Printed in Yugoslavia.

**EL NIA
 ARKIVO**

Rekaraktizo:

Rekaraktizo:

1 kaj 2.

1 kaj 2.

2. Esperantista.
 3. la kongres.
 3.